

Esperanto-vivo en Svislando, 4-a parto
Librovendejoj
Claude Gacond, 393-a radioprelego, 1971.04.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- Ni diris kelkajn vortojn pri la pozitivaj rezultoj de inform-kampanjo, kiun ni faris malfermante esperanto-kronikon en kelkaj semajnaj gazetoj.

Cl.- Ĉar ni ĉesis diri, kio estas esperanto, sed rakontis, kion oni povas fari pere de esperanto, ni vekis la intereson de la legantaro. Pli ol 800 informiloj kaj dokumentaroj pri esperanto estis petitaj al ni.

A.- Tiuj inform-artikoloj havis du nerektajn konsekvencojn. Multaj legantoj iris al libro-vendejoj por aĉeti lernolibron de esperanto, kaj ili unue ricevis la respondon, ke esperanto ne plu ekzistas. Poste, ĉar daŭre aĉetemuloj vizitis la librejojn, la librovendistoj sin turnis al Kultura Centro Esperantista por akiri lernolibrojn kaj vortarojn.

Cl.- La dua konsekvenco estis petoj prelegi antaŭ sufiĉe vastaj publikoj okaze de kunsidoj de kulturaj aŭ politikaj asocioj.

A.- La petoj je libroj fare de libristoj kaŭzis malfacilaĵojn, kiujn ni ne kapablis solvi.

Cl.- Legante la informilojn de Pilo-Press, kiujn dissendas sinjoro Ludwig Pickel el Germanio, ni konstatis, ke ni ne estas la solaj, kiuj alfrontas tiun malfacilaĵon.

A.- Ĝis nun ni kontentiĝis organizi libro-servojn, kies vendado estas organizata interne de la esperanto-movado. La esperantistoj konas la adresojn de tiuj servoj. Ekzemple la svisoj direktas siajn mendojn al la libro-servo de UEA, de SAT, de Heroldo de Esperanto aŭ en Svislando mem de Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Tiu lasta libro-servo estis reorganizata ekde oktobro 1970, por ke en ĝi oni trovu ĉiujn esperanto-librojn. Sed la rabatoj, kiujn tiuj servoj ricevas de la esperanto-eldonistoj estas ege malaltaj. Ili ne respondas al la normoj praktikataj en la normala libro-komerco, kio estas 60 procentoj. Pro tio, kiam ni ricevas mendojn venantajn el la libro-vendejoj, ni ne scias kion fari.

A.- La esperantaj libro-servoj povas kontentiĝi je tiuj malaltaj rabatoj de 15 ĝis maksimume 33 procentoj, ĉar ili ne celas profiton kaj ne salajras oficistojn.

Cl.- Kontraŭe la libro-vendejoj havas oficistojn, kiuj devas esti regule salajrataj kaj regulajn elspezojn, kiujn niaj duonprivataj libro-servoj tute ne konas. Pro tio la librovendejoj ne povas kontentiĝi pri la rabatoj, kiujn ni povas oferti al ili. Ekzemple la libro-servo de Kultura Centro Esperantista kalkulas siajn prezojn por povi ĝenerale oferti rabaton de 20 procentoj al la libro-vendejoj.

A.- Por povi normale komerci, ni devus povi oferti rabaton de 38 procentoj. Tiam la libristoj malfermus en siaj libro-vendejoj kolekton da esperantaĵoj. Se ni ofertas malpli ol tiu rabato de 38 procentoj, la librovendistoj ne interesiĝas pri la esperantaĵoj.

Cl.- Fakte ni troviĝas en diabla cirklo. Ĉar la eldonnombro de la esperanto-libroj ne estas sufiĉe alta, tiam la eldonejoj provas malaltigi la prezojn de la libroj malaltigante la rabaton, kiun ili ofertas al la libro-perantoj.

A.- Ĉar tiu rabato ne respondas al la normala rabato, tiam la publika libro-merkato estas al ni fermita.

Esperanto-vivo en Svislando, 4-a parto
Librovendejoj
Claude Gacond, 393-a radioprelego, 1971.04.21 & 24

Cl.- Ĉar la publika libro-merkato estas al ni fermita, tiam ni vendas librojn nur al fermita rondo de personoj, kiuj estas informataj pri la ekzisto de la esperanto-servoj. Konsekvence ni vendas malmultajn librojn.

A.- La libro-servo de Kultura Centro Esperantista provos iomete altigi la prezon de kelkaj fundamentaj libroj : lerniloj kaj vortaroj, por povi interesi la publikajn librerojn al la malfermo de stoketo da libroj pri esperanto.

Cl.- Sed tiu problemo solviĝos, nur kiam tiu agado estos internacie organizata. Inter niaj diversaj libro-servoj ekzistas prez-konkurenco. Se ni volas, ke la publika merkato interesiĝu pri nia literaturo, ni devus komenci organizi niajn servojn sur pli taŭgaj fundamentoj.

A.- Kiel la kontaktitaj libristoj diris al ni, ni devus ĉesi rigardi la mondon per okuloj de idealistoj por ekzameni la faktojn per okuloj de komercistoj.

Cl.- Laŭ niaj scioj neniam idealistoj venkis en komercaj agadoj, dum multaj komercistoj efektivigis en la ĉiutaga vivo utopiaĵojn. Kiam ni ofertas al almenaŭ po unu librovendisto en ĉiu urbo minimume normalan profiton de 38 procentoj je la libro-vendoj, ni tutcerte ricevos la aktivan kunlaboron de komercistoj.

A.- Estas en tiu direkto, ke Kultura Centro Esperantista deziras eklabori. Ŝildetoj estos desegnitaj. Ilin ni gluos ĉe la pordoj de la libro-vendejoj, kiuj akceptos peradi por ni en la ĉefaj urboj de Svislando. Tiel la interesuloj pri esperanto scios, kie ili povas trovi lernolibrojn de esperanto.

Cl.- La nuna vendsistemo estas ege maloportuna. Monaton post monato ni ricevas plendojn de novuloj. En tiuj leteroj ni estas informataj, ke de monatoj aŭ eĉ de jaroj tiuj personoj serĉis eblecon pro aĉeti lernolibron de esperanto. Fine, pere de unu el niaj artikoloj, ili povis kontakti la esperanto-movadon. Ili ne trovas, ke tiu situacio estas normala. Ankaŭ ni trovas tion.

Ni esperas, ke en aliaj landoj oni faris la saman malkovron.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-